Bolanta Kaldrono

INFORMILO *272 de la*
Esperanto - Grupo Bremen
Oktobro – Novembro 2004

Sekr: D-ro Hans Walter Krüger, Dordrechter Str 36, 28259 Bremen, Tel: 0421 561943
Informoj: Prezidanto OstR Hellmut Grebe, Tel: 0421 3963480
Kasistino: Ruth Bohn, Tel: 0421 382715
Red: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen, Tel: 8476806

Vizitu nin en interreto: **www.esperanto.de/bremen**
Dort präsentieren wir unser aktuelles Programm und unsere Zeitung Informilo

Aŭtuno invitas legi



Nia grupo disponas pri riĉenhava biblioteko!!

Utiligu la aŭtunan tempon

legi Esperanto-librojn.

D-ro Hans-Walter Krüger ofertas dum grupvespero
kelkajn legindajn librojn.

Adiaŭo, kara Bodo Ehrlich

Ni ĉiuj tre bedaŭras, ke vi el profesiaj kaŭzoj devas forlasi nin. Niaj plej bonaj deziroj akompanu vin al München. Tamen ni esperas, ke ni povos de tempo al tempo revidi vin en nia grupo. Akceptu nian dankon pro via aktiva kaj fruktodona kunlaboro en nia grupo. Ni deziras al vi tutkore sukceson kaj feliĉan estontecon.

Nome de la Esperanto-Grupo Bremen via Dieter Hartig

Nia programo

(Ĝenerale je la 20-a horo en nia kunvenejo Brodelpott)

La 8an de Septembro. Diskutoj pri aktualaĵoj. Aranĝita kaj gvidita de Kurt Meyer.
La 13an de Oktobro. Travivaĵoj en la feria tempo. La membroj raportas pri feriaj travivaĵoj.
10an de Novembro. Ni ludu sub la sperta gvidado de Elisabeth Kruse
8an de Decembro. Zamenhoffesto. Invitas familio Kruse.
Januaro. Ni bonvenigu la Novan Jaron. Ni esprimu niajn dezirojn kaj esperojn.
Februaro. Nia Jarkunveno.

Retrospegulo

Familio Kruse ekskursis tra Usono. Prelego de Franz Kruse la 9an de junio

Estis el ĉiu vidpunkto unika kaj eksterordinara prelego. El teknika vidpunkto estis la perfekta komputila projekcio de elstare belaj kaj interesaj bildoj. La klarigoj kaj priskribo de la vojaĝo okazis en agrable flua kaj bonstila Esperanto.

La necesaj instalaĵoj jam estis aranĝitaj kiam la interesitaj membroj alvenis. Denove estis nia kunvenejo tiel plenplena, ke ni devis preni seĝojn el la apudaj ĉambroj. Unue Franz projekciis la mapon de Usono kaj montris al ni la vojon kiun la kvinpersona familio entreprenis tra la vasta lando. Ili komencis la vojaĝon en Novjorko. Ni vidis bildojn el tiu giganta urbo el diversaj perspektivoj, eĉ el la fajrobrigarda. Rigardante la bildojn, oni sentas la ekstreme viglan vivon sur ĉiu bildo sub alia impreso. Al Vaŝingtono ili veturis per buso de ĉina entrepreno. Jen ili sidis inter ĉinaj kunveturantoj. Ankaŭ el Vaŝingtono ni vidis interesajn bildojn, konataj,objektoj kun personaj aldonoj. Per aviadilo ili vojaĝis al San Francisco. Interesaj bildoj kaj viglaj raportoj pri la travivaĵoj imponis nin, precipe tiuj pri la mondfama Golden-Gate-Ponto, al kiu niaj vojaĝantoj dediĉis grandan atendon Ni estis konfrontitaj per tiom da okazaĵoj, ke mi povus plenigi per ĝi la tutan Informilon. Per aŭto la familio veturis laŭlonge de la marbordo al Los Angeles kaj tiam tra la dezerto al Las Vegas. De tie la bildoj elŝprucas ekstreme viglan vivon. Ĉiuj aŭskultantoj reagis gaje kaj miris pri tiu ekscesa loko meze en la dezerto. Per aviadilo ili atingis Orlandon en Florida,. Jen la bildoj donis tute alian aspekton. Jen elstaris la Disney-Parko. La lasta stacio estis Miami, de kie ili flugis hejmen.

Ni estas konvinkitaj, ke tiu vojaĝo restas dumviva memoraĵo en la Kruse-familio kaj ni ĉiuj gratulas kore pri tiu komuna entrepreno.

Multaj demandoj sekvis post al fino de la prelego. Oni povas konstati, ke ĉiu estis precipe tuŝita de iu temo. Pacience Elisabeth kaj Franz respondis ĉiujn demandojn. Tre koran dankon, karaj Elisabeth kaj Franz. Vigla aplaŭdo dankis sincere.

Dieter Hartig

Vizito al Groningen

La kutimaj reciprokaj vizitoj inter la Esperanto-grupoj de Groningen kaj Bremen evidente bezonis novan impulson: La antaŭ-kristnaska tempo ŝajne montriĝis malkonvena por multaj grupanoj, tiel ke la vizitoj komencis lami kaj oni pripensis alternativojn.

La bezonata impulso nun venis en malfrua printempo: La 12an de junio tri aŭtoplenoj da vojaĝantoj survojiĝis okcidenten. Grave kontibuis al la karavano niaj kolegoj el Oldenburg kaj la subvisurga regiono. Same en Groningen atendis nin ne nur lokaj grupanoj, sed ankaŭ pluraj ekster-Groningenaj esperantistoj, tiel ke je 10:30 h en la kafejo de la (cetere tre bela) ĉefstacidomo ariĝis nekutime granda grupo de 30 homoj.

La nederlandaj geamikoj komence regalis nin per kafo, kaj tuj poste ni ekis al ŝipekskurso tra la kanaloj kaj la haveno de Groningen. La etoso estis brila, feliĉe ankaŭ la vetero, kiu malgraŭ malmultaj pluvetoj bone kunludis. La ŝipekskurso donis al mi tute novan impreson pri Groningen. Kvankam mi vizitis la urbon plurajn fojojn, mi estis surprizita, ke ĝi havas tiom da kanaloj, kiujn mi ĝis nun ne vidis. La ekskurso estis bonege preparita flanke de la groningena grupo, ĉiu ekskursanto ricevis skriban Esperantan tradukon de survojaj klarigoj.

Tagmeze la tuta grupo renkontiĝis en la kunvenejo de eklezia komunumo, kiu servas kiel klubejo al la Esperanto-grupo. Ni havis okazon manĝi supon kaj la diversajn bongustaĵojn el niaj lunĉpakaĵoj, kiujn oni preparis por ni. Nun estis tempo por Johan Swenker, la prezidanto de la groningena grupo, saluti kaj bonvenigi la partoprenantojn kaj peti ĉiun koncize prezenti sin.

Tuj poste Wil van Ganswijk, la ĉefa organizantino de la aranĝo, jam preparis nin por la venonta programero: vizito al la muzeo pri navigado. Aldone al ŝiaj lertaj klarigoj ni denove ricevis skriban materialon. - Nu, mi devas konfesi ke la internon de la muzeo mi ne vidis, ĉar kelkaj homoj ne povis rezisti la allogan veteron kaj spontane decidis fari privatan promenadon tra la urbocentro - kiu ankaŭ montriĝis bela travivaĵo.

La finon kaj kulminon de la tago formis komuna manĝo sur "krespoŝipo", restoracia ŝipo, kiu ofertas ĉefe krespojn (patkukojn). La tuta grupo sidis ĉirkaŭ grandega tablo, antaŭ ni stakegoj da patkukoj kun

kaj sen lardo, de kiuj ni povis manĝi tiom kiom ni kapablis, kaj aro da bongustaj aldonaĵoj por garni kaj spici la patkukojn. Ĉu mi menciu ke ni forlasis Groningen sategaj?
Ni ĉiuj tre ĝuis tiun tagon, kies sukceson, mi pensas, ni dankas precipe al la organiza kapablo de Wil van Ganswijk. Kaj ĝi estis vera stimulo: Krom la bremenanoj ankaŭ la subvisurganoj pripensas inviti la nederlandajn geamikojn venontjare al aranĝo en Germanio.

Franz Kruse

Nia tradicia Ĝardenfesto en la ĉedoma ĝardeno de la familio Grebe, la 7an de julio. Oni jam de malproksime povis ekvidi la fumsignalojn per la ekbruligo de la rostigiloj, kiujn Hellmut Grebe elsendis por saluti la gastojn.
Iom post iom la ĝardeno pleniĝis per gajaj gastoj. Por ĉiuj estis ebleco aranĝi sin komforte. El la EGU la Esperanto Grupo Unterweser partoprenis kelkaj membroj. El inter ili invitis Anne Höpken nin partopreni al la kunveno en Elsfleth. Tiam ŝi estos denove hejmen el la UK en Pekino. Tio estas sendube tre interesa raporto. Ĉeestis kelkaj Esperantistoj el Oldenburg.
Dagmar kaj Hellmut Grebe invitis nin akcepti la regalon per viando, trinkaĵoj kaj aliaj frandaĵoj. Ni eksciis la kaŭzon: Ili ambaŭ estas nun pensionitaj kaj antaŭvidas komunan vivion sen la geinstruistaj problemoj kaj malfacilaĵoj. Ni gratulis sincere kaj deziras al ambaŭ feliĉan vivon en kontentiga bonfarto.
Estis gaja rondo da feliĉaj homoj kaj la babilado plenigis la malgrandan ĝardenon.
La interparolado estis vigla kaj la humoro radiis en nia rondo. La rostiloj vigle liveris plej diversajn frandaĵojn. Ankaŭ je salatoj, kunprenitaj de diversaj gastoj, ne mankis ĉe la delikata oferto.
Estis vere agrabla vespero. Krepuskis jam, kiam la unuaj adiaŭis pro la longa vojo hejmen.
Ni diru al Dagmar kaj Hellmut tre koran dankon pro tiu bela kunveno kaj pro via riĉa regalo. Ni ĉiuj deziras al vi feliĉan agrablan novan vivperiodon.
Kun danko ni adiaŭis de tre bela ĝardenfesto.

Dieter Hartig

Das Hexen - Einmaleins



Tiel mi imagas modernan sorĉistinon. Jes, ja, per balailo, sed ĝi moviĝas per turbopropo, kaj por la sorĉistina multobliga tabelo ŝi sendube havas komputilon en la balailo.

Das Hexen-Einmaleins.

El la plumo de Johann Wolfgang Goethe
Trovebla en «Faust»

Du musst verstehn!
Aus Eins mach Zehn
und zwei lass gehn`,
und drei mach gleich,
so bist du reich.

Verlier die vier!
Aus fünf und sechs,
so sagt die Hex`
mach sieben und acht,
So ist`s vollbracht:
und neun ist eins,
und zehn ist keins.
Das ist das Hexen-Einmaleins.

Traduko por niaj eksterlandaj amikoj, precipe por mia kara amiko kaj iama Fervoja Esperanta sekretario**. Nobuki, Naosuke** en Japanio.
Mi sincere esperas, ke la granda Majstro Goethe pardonos mian perfortigon.

La sorĉistina multobliga tabelo

Vi devas kompreni!
El unu faru dek
kaj du forigu,
kaj tri rondigu
tiel vi estas riĉa.

Perdu la kvar!
El kvin kaj ses,
tiel diris la sorĉistin´
faru sep kaj ok,
tiel estos plenumita:

Kaj nau estas unu,
kaj dek estas nenio.
Tio estas la sorĉistina
multobligo.

Aranĝita de Dieter Hartig